PEKINA DEKLARO

La 89ª. Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Pekino, Ĉinio, de la 24ª. ĝis la 31ª. de julio 2004, kun 2031 partoprenantoj el 51 landoj,

- ***traktinte*** *la temon* ***Lingva egaleco en internaciaj rilatoj,***

- ***notante,*** *ke la jaro 2004 markas 50 jarojn da oficialaj rilatoj inter UEA kaj Unesco,*

- ***memorante,*** *ke rezolucioj de Unesko notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo kaj rekonis, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko,*

- ***notante*** *la* ***Raporton pri Homa Evoluigo 2004*** *de la Evoluiga Programo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu asertas, ke la libereco de esprimado kaj la uzado de lingvo estas nedisigeblaj,*

- ***alte taksante*** *la agadon de la ĉina registaro, kiu, cele al pli justa kaj diverseca aliro al internacia interkompreniĝo, subtenas la instruadon kaj utiligon de Esperanto, konforme al la spirito de la rezolucioj de Unesko,*

DEKLARAS

- **ke** demokratia kaj egalrajta komunikado en internaciaj rilatoj estas esenca por internacia interkompreno kaj paca kunlaboro surbaze de egalaj lingvaj rilatoj,

- **ke** estas bezonata nova internacia lingva ordo, kiu garantiu egalecon, diversecon kaj demokration en lingvaj aferoj kaj efikan komunikadon inter nacioj kaj aliaj homgrupoj lingve malsamaj, ĉar en la nuna monda lingva situacio, kun kreskanta superrego de iuj lingvoj super aliaj, ne eblas realigi tiujn principojn,

- **ke** neŭtrala komuna lingvo estu kerna elemento en tiu ordo, por atingi unuecon en diverseco inter la diversaj lingvoj kaj kulturo je internacia nivelo,

- **ke** sekve la internacia lingvo Esperanto, pruvinte dum pli ol cent jaroj sian utilecon kaj praktikecon, meritas seriozan konsideron fare de internaciaj organizoj, ties membro-ŝtatoj kaj ĉiuj personoj kaj organizaĵoj de bona volo, kiuj respektas kaj deziras pacon kaj pacan interkompreniĝon en egaleca etoso en nia hodiaŭa mondo,

- **ke** por krei novan internacian lingvan ordon, kiu kontribuos al internacia kompreno kaj mondpaco, necesas forte subteni la enkondukadon de Esperanto en lernejojn, konforme al la spirito de la Unesko-rezolucioj, ĉar tio faciligas la lingvolernadon ĝenerale kaj antaŭenigas internaciecan aliron al la mondo.

Fonto: www.kke.org.br – Fako: Esperanta Dosiero